n-ro 40

aprilo 1993

ISSN 0941-9306

# La Merkato

La kasisto dankas pro la jam ricevitaj kotizoj por 1993. Sur via adresa etikedo vi povas kontroli ĝis kiu jaro via membreco estas registrita. Atentu ke la servoj de IKEF (identecŝildaro, alsendo de *monda merkato*) estas rezervitaj al membroj kiuj ĝustatempe pagis sian kotizon.

Ĉu vi jam resendis vian demandaron por la nova identecsildaro ? Se ne, rigardu la lastajn paĝojn de la antaŭa *La Merkato* !

**Limdato por LM 41 estas fino de junio !**

---

**Enhavo**

Staĝoj kaj konferencoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . 4
Terminologio . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 5
Identecŝildaro . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 6
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . . . . . . 6-7
Kunlaboro inter IKEF kaj *monda merkato* . . . . . . . . . 8
Financa raporto pri 1992 . . . . . . . . . . . . . . . . 9-11
Administrado - raporto pri agado dum 1992 . . . . . . . 12-16
Novaj aliĝoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 16
Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj . . . . . . 17
Polo ekkonas okcidentan ekonomion . . . . . . . . . . . 18-19

**La Merkato (LM)** estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

**La Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun (FJB), Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert (RR), Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert (FXG); D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König (dk).

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-W-7580 Bühl 16, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**: Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono: +32.(0)50.330004.

**Redaktora sidejo**: Provizore ĉe Roland Rotsaert.
Nova adrese de DK aperos en la venonta numero.

---

**La jara membreca kotizo** estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj. Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

**Kontoj**: Ĉe UEA kaj FEL, kodo ikef-c, kaj belga poŝtĉekkonto 000-1592629-83.

**Perantoj**:

*Cinio*: S-ro **WANG Tianyi**, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao,
CN-710054 Xi'an

*Francio*: S-ro François-Xavier **GILBERT**, F-55000 Longeville en Barrois
(CCP 1275-89 L Nancy)

*Germanio*: S-ro Franz Josef **BRAUN**, Hornisgrindestr. 8, D-W-7580 Bühl 16
(Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

*Hispanio*: S-ro Pedro Antonio **MACANAS VALVERDE**, Av. Libertad, 6-2,
E-30009 Murcia (Banco Hispano-Americano 0049, Asoc. Grupo Esperantista "Ricardo Coderníu", n-ro 672-1; Kotizo: 1.250 ptas.)

*Hungario*: D-ro István **GETHER**, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio*: D-ro Marco **PICASSO**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

*Japanio*: S-ro **YAMASAKI** Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi,
Higasi Koigakubo 3-18-12 (pĝk. n-ro Tôkyô 6-253232, kotizo 1400 enoj)

*Pollando*: S-ro Maciej **PIEGAT**, ul. Dantego 1-B/48, PL-01-914 Warszawa

*Jugoslavio*: S-ro Sotir **TALESKI**, ul. 'Oslo' br. 12, YU-91000 Skopje

*Togolando*: S-ro Gbeglo **KOFFI**, B.P. 13169, Nyékonakpoé, Lomé

## STAĜO PRI INFORMADO KAJ PUBLIKAJ RILATOJ EN BOURESSE (F)

Kiam: 3a ĝis 8a de aŭgusto 1993

Kie: "La Kvinpetalo", Bouresse (25 km de Poitiers)

Kiu: Marco PICASSO, fakulo pri merkatado kaj informado
Prezidanto de Itala Interlingvistika Centro
Ĉefredaktoro la itallingva E-revuo "Lingua verde"
Estrarano de IKEF

Celo: Formi homojn kiuj deziras fariĝi informistoj pri Esperanto

**Programo**

Unua tago
Difinoj de la faka terminaro: esperantigo de specifaj vortoj kiel "marketing", "target", "P.R.", "plus"...
Difino de (mis)uzataj vortoj kiel informado, varbado, reklamado...
Kian Esperanton vendi ? Kio Esperanto reale estas ?

Dua tago

Ĉu lingvoj estas nur kaj simple lingvoj ?
Surmerkatiga analizo de lingvoj

Tria ĝis kvina tagoj

Praktikaj ekzercoj

**Pliaj informoj:**

"La Kvinpetalo", F-86410 BOURESSE, tel. (33) 49.42.80.74

## Turisma-Komerca Konferenco en Latvio - 19-22 majo 1993

"Esperanto-Buroo Kemespo" meze de majo en konferencejo de la Liepaja Latva Societo organizos konferencon

"SUKCENA BORDO-93"

Programeroj:
- Perspektivoj de Esperanto kaj internacia turismo
- Problemoj de Esperanto-instruado
- **Ekskursoj al plej grandaj fabrikoj de la urbo**

Kotizoj: (enestas loĝado kaj manĝado)
Ekssovetanoj 10 USD; aliaj 150 USD, pagotaj surloke

Informoj:
"Esperanto-Buroo Kemespo", abonkesto 1064, LV-3416 LIEPAJA 16, Latvio; tel. 01334-25336 aŭ 36400 (ankaŭ fakso)

## Internacia Kunlabora Kunsido en Xi'an, Ĉinio

De la 20a ĝis la 25a de aŭgusto 1993, en hotelo Yeyuan, la ĉina peranto de IEF kaj Shaanxi-provinca Industria-Komerca Federacio invitas aktivulojn ĉeesti kunlaboran kunsidon. El la programo:

- interŝanĝo de spertoj pri apliko de Esperanto;
- livero de komercaj partneroj;
- fondo de komerc-ekonomia reto de IKEF tra Ĉinio.

Aliĝa kosto: 10 USD. Restada kosto je persono (ĉio inkluzive): 100 USD por dulita, 140 USD por unulita ĉambro.

Informoj: S-ro WANG Tianiy, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 XI'AN, telefono/fakso +86 29 33 96 19, telekso 70182 SXSTW.

## **Terminologia laboro de IKEF**

Kun granda bedaŭro ni devas avizi al nia membraro, ke s-ro Hans Wiersch (IKEF 19) demisiis de sia posteno kiel kunordiganto de la Terminara Sekcio pro opiniaj diverĝecoj lingvistikaj.

Sub lia kunordigado estis esperantigitaj la terminaroj "Key words" (Komerca Terminaro) kaj "Économie-Finance-Monnaie" (Ekofomo). Ni multe dankas al li pro lia agado por IKEF.

FJB

## **Konferenca terminologio**

La traduka kaj konferenca servoj de la Eŭropa Komunumo kaj IAPCO (Internacia Asocio de Profesiaj Kongresorganizantoj) kune eldonis novan version de *Meeting Industry Terminology* (terminologio de la konferenca industrio).

La verko enhavas pli ol 600 difinojn en angla lingvo, kun tradukoj al dana, nederlanda, franca, germana, greka, itala, portugala kaj hispana lingvoj - entute la 9 oficialaj lingvoj de la EK. Ankaŭ estas indekso por la 9 lingvoj.

Prezo: 35 ekuoj + AVI (ĉ. 80 DEM). Havebla en librovendejoj kaj ĉe la vendejo de oficialaj publikaĵoj de EK, 2 Rue Mercier, L-2985 Luxembourg.

## Identecŝildaro

Al la alvoko en *La Merkato* 39 venis multaj reagoj. Jen superrigardoj de la ricevitaj proponoj (alfabete ordigitaj):

Identigilo
IKEF-a personaĵaro
IKEFa demandaro
IKEF-listo
Kiu estas kiu en Esperantuja komerco
Komerca helpanto
Komercofertoj internaciaj
Konciza membrara bibliografio
Membrara detalaĵo enIKEF
Membrara identeco en IKEF
Membro-interkomunikiĝo
Membrofiguraĵo
Monda komerca adresaro

Personoj kies demandilo jam estis registrita, vidos supre sur sia adresa etikedo de tiu ĉi LM sian telefonan kaj faksan numerojn. Bv. kontroli.

En la demandilo de LM39 la parto pri lingva scio estis forgesita. Ni transprenos la informojn de la antaŭa iŝ.

## Komercaj petoj kaj proponoj

Ĉinio

**VSIKIF (VS Internacia Kunlabora Informo-Firmao** estas fondita de Xian-aj esperantistoj. Celoj: interŝanĝo de studentoj, havigo de komercaj informoj, helpo pri investoj, vizitoj, ekspozicioj, ktp.
S-ro Zuo Jun, direktoro, Jinhua heilu 2 hao, 2-3-302,
CN-710032 XIAN SHI, telefono/fakso 0086-029-339619.

**Komercaj kaj ekonomiaj informoj pri Ĉinio** per granda entreprenara adresaro; tradukoj ĉina-Esperanto.
S-ro Vang Bing, Meicheng, Qianshang, CN-246300 ANHUI.

**Mineralakva fabriko, produkta valoro 20 milionoj da usonaj dolaroj jare,** serĉas kunlaborantojn kaj investantojn por modernigo de la muntadaj ĉenoj. S-ro Fang Rui, Kuangqian-shuigongshi, Tianzhushan, Qianshan, CN-246300 ANHUI, telefono 05668-22988.

Kolombio

**Eksporto de mielo**: S-ro Rubon Rorres, Carrera 85 # 15-68, CALI, Kolombio. Importistoj aŭ perantoj skribu esperante, angle, hispane aŭ eĉ propralingve.

Uzbekistano

**Komercaj kontaktoj, turismo, komercaj vojaĝoj, importo-eksporto**: Firmao "ORIENTO", P.O. Box 76, 703000 SAMARKAND. Tel. +7 (3662) 33.17.53 (esperante, angle, ruse).

Korektoj

En ĉina propono aperinta en LM 38 estis kelkaj eraretoj; pro tio ni ripetas ĝin:

Kunaj investoj en ĉinio. Skribu al s-ro Han Yaohua,
Wuhan Shi Wuchang Xian, Liufang Gongxiaose, CN-430205 ĈINIO.

Anonco en LM 38, p. 13, de hungara "MINI MAX B." estu korektata jene:

1233 SOFIO, tel. 00359-2-311437, fakso 00359-2-885349

## Kunlaboro inter IKEF kaj *monda merkato*

Dum la jaro 1992 jam (prove) okazis kunlaboro inter IKEF kaj *Linguistisches Bureau Alfred Schubert*, eldonanto de la anonca revuo *monda merkato*. Vi povas detale legi pri tio en la jara raporto, aliloke en ĉi-tiu numero.

Dum 1993 la kunlaboro plue daŭros. IKEF-membroj kiuj ricevas iun proponon kiun ili mem ne povas pritrakti, sendu ĝin al Roland ROTSAERT; tiu grupigos ilin por aperigo en *monda merkato*. Ankaŭ dum 1993 *monda merkato* estos sendata al la aktivaj membroj de IKEF. IKEF-membroj kiu mem ne havas intereson pri mm bonvolu transdoni la ricevitan ekzempleron al alia persono. Se ĝi estas vere senutila, ili avertu RR por ke li eligu ilin el la mm-adresaro.

IKEF ankaŭ rajtas senpage aperigi en *monda merkato* anoncojn de siaj membroj. Ni rezervas tiujn anoncojn al membroj el landoj kun pagaj problemoj. Tia membro kiu pagis sian kotizon por la kuranta jaro kaj deziras aperigi anoncon (prefere ne pli longa ol 5 linioj) sendu ĝin al Roland ROTSAERT, kiu plusendos al mm. Ĉar la disponebla spaco estas limigita, anoncoj estos pritraktataj en vicordo de ricevo.

## **IKEF: kunlaboranta aŭ aliĝinta faka asocio al UEA ?**

Plimulto de la estraranoj opinias ke IKEF iĝu aliĝinta faka asocio, sed necesas trovi seriozan kaj kapablan reprezentanton por la UEA-komitato. Tiu reprezentanto ne nur estu IKEF-membroj, sed ankaŭ ĉeestu ĉiujn universalajn kongresojn, por partopreni la kunsidojn de la komitato.

Kandidatoj anoncu sin ĉe la prezidanto.

## **Financa raporto pri 1992**

Sur la mezaj paĝoj de ĉi tiu revuo troviĝas la spezokonto kaj bilanco pri 1992 kaj buĝetpropono por 1993.

Por la pasinta jaro restas pluso de 9.532 frankoj. Ĝi ĉefe ekestis pro du faktoroj: (1) elspezojn por la identecŝildaro kaj por la subtena fondaĵo (= kunlaboro kun *monda merkato*) ni grandparte kovris per rezervoj kreitaj en la antaŭa jaro kaj (2) denove la donacoj atingis konsiderindan sumon.

Kostoj de la identecŝildaro estis 8 661 frankoj, kontraŭ enspezoj de nur 494 frankoj. Por *monda merkato* ni elspezis pli ol antaŭvidite: 14 656 frankojn (por 3 numeroj, el kiuj la lasta aperis nur komence de 1993) - vidu ankaŭ DP 9204.

Ĉefa elspezo por terminologia laboro estis esperantigo de la terminaro *Economie, Finance, Monnaie* de la Eŭropa Komunumo. Ĝi estis nur kopiita en eta kvanto.

Unuafoje mi ankaŭ preparis buĝetproponon. De La Merkato denove estas planataj 4 numeroj; se ni sukcesos pli bone plani ĝian eldonan daton, eblos iomete ŝpari en kostoj de kopiado kaj afranko. Por informado estas antaŭvidita reeldono de la IKEF-informilo, kies stoko estas preskaŭ eluzita. Mi esperas ke la ricevitaj membrecaj kotizoj kreskos laŭ la ritmo de la pasintaj jaroj. Por donacoj mi antaŭvidas malpli grandan sumon.

La "sumo disponebla por aliaj celoj" laŭ ĵusa decido de la IKEF-estraro estos uzata por daŭrigo de la kunlaboro kun la revuo *monda merkato*, pri kiu troviĝas artikolo aliloke en ĉi tiu numero.

Roland ROTSAERT
Financa Konsilanto de IKEF

## Administrado

**Grava atentigo al niaj membroj !**

1. La estraro prezentas sur la sekvantaj paĝoj sian raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 1992 kaj proponas aprobon de tiu raporto.

2. La estraro prezentas sur la paĝoj 9-11 la financan raporton de IKEF por la jaro 1992, notante ke la ciferoj estas prezentitaj en bona tempo al la revizoro. D-ro Polerani juĝis ilin bonaj kaj en ordo. Tial la estraro proponas aprobon de tiu financa raporto.

3. La estraro notas la sumon de financa gajno de 9.532 BEF kaj proponas aldonon de tiu gajno al la kapitalo.

4. La estraranoj d-ro Gether, s-ro Gilbert, s-ro König, s-ro Rotsaert kaj s-ro Yamasaki, ĉiuj elektitaj en 1991, baldaŭ estos du jarojn en sia ofico. Laŭ la statuto de IKEF, alineo 7.1, dua frazo, estrarano tenas sian oficon dum du jaroj. Do ilia estraraneco finiĝos en julio ĉi-jare. Reelekto eblas. Ĉiuj pretas kandidatiĝi.
En la nomo de IKEF, la aliaj estraranoj dankas ilin pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du jaroj kaj proponas al la membraro reelekton de ili.

5. Nia statuto, alineoj 7.4 kaj 8, montras la procedon pri aprobo kaj de la raporto pri agado, kaj de la financa raporto, kaj pri elekto de estraranoj. Ĉi-jare ni denove organizos Ĝeneralan Kunvenon por niaj membroj kadre de la Universala Kongreso en Valencia, Hispanio. Diskutado pri aprobo de la raportoj (vidu punktojn 1-3 supre) kaj elekto de estraranoj (vidu punkton 4 supre) okazos tie. Membroj kiuj ne povos veni al Valencio, rajtas skribe komisii alian membron ĉeestantan pri aprobo kaj voĉdonado; tiun agon la estraro rekomendas.

La Estraro de IKEF

## **Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 1992**

### Membraro denove kreskis

Dum la jaro 1992 la membraro denove kreskis, nome de 102 al 114 membroj. Bedaŭrinda fakto estas, ke 9 ĝisnunaj membroj dum 1992 forlasis nian fakgrupon. Tamen la 21 novaj aliĝoj pli ol kompensis tiun malpliiĝon. Rimarkinde estas, ke la novaj membroj grandparte venas el ekssocialismaj landoj. Ili strebegas al rapida ŝanĝo en siaj landoj por libermerkata ekonomisistemo.

### "La Merkato" retrovis sian regulan ritmon

Dum ke en 1991 nia komunikilo "La Merkato" estis stumblinta kaj aperis nur dufoje, en 1992 ni povis realigi nian promeson pri regula aperado. Ĝi aperis kvarfoje.

### Terminara Sekcio esperantigis "Ekofomo"

Nia Terminara Sekcio sub kunordigado de s-ro Hans Wiersch, Germanio, finis sian tradukan laboron pri la naŭlingva EK-terminaro "Economie - Finance - Monnaie" (Ekonomio - Financo - Mono). Sub la siglo "Ekofomo" ni prezentis ĝin al la Esperantistaro dum la UK en Vieno.

Plie ni sendis ĝin al la Komisiono de la Eŭropa Komunumo, Bruselo, kun la propono, ke EK aldonu ĉe noveldono de sia glosaro Esperanton kiel dekan lingvon. Por demonstri al EK la seriozecon de Esperanto kaj de nia laboro, ni deklaris nin pretaj helpi per niaj membroj al EK ĉe tradukado el/al aliaj - ekzemple orienteŭropaj - lingvoj.

Bedaŭrinde ĝis nun ni ne ricevis seriozan, sed nur pretekstan, malkonvinkan respondon. Montriĝas denove, ke EK, malgraŭ kelkfoje alia ŝajno, efektive celas koncentri sin al la angla kaj franca lingvoj, kaj neglekti kaj la aliajn naciajn lingvojn kaj planlingvon kiel ekzemple Esperanto.

Bedaŭrinde nia Terminaro Sekcio travivis gravan malprosperiĝon, per la demisio de sia kunordiganto, s-ro Hans Wiersch (vidu paĝon 5).

### Verka agado sur iom malalta nivelo

Jam lastjare ni konstatis regreson de la verka agado de

IKEF. En la ĉi-jara raporto ni devas konstati, ke dum 1992 ne okazis sentebla pliboniĝo, ĉar la tiam kritikita stato ankoraŭ ekzistas.

La "Ekonomia Bulteno pri Usono" de nia membro d-ro Goldman, Usono, laŭdinde ankaŭ ĉi-jare regule aperis ĉiumonate. Ĝian abonon ni varme rekomendas. Ankaŭ nia membro d-ro Bormann, Germanio, kiu konstante lekcias en AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj) denove eldonis broŝuron 72-paĝan pri ekonomia temo, ĉi-foje pri "La merkato de trafikservoj".

En "Monato", internacia magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo, aperis artikoloj de niaj membroj Roland Rotsaert, Belgio, d-ro Thomas Goldman, Usono kaj s-ro Yamasaki Seikô, Japanio. S-ro Rotsaert eĉ fariĝis responsa por la rubriko ekonomio en nova plurkapa redaktistaro de "Monato". Ĉe tiu okazo ni denove volas atentigi niajn membrojn pri tio, ke "Monato" estas la ĉefa tribuno por nia verka agado. Tial ni rekomendas al niaj membroj la abonon de "Monato" kaj plie - se eblas - la kunlaboron per verkado de artikoloj pri ekonomiaj temoj.

<u>Praktikaj agadoj</u>

Dum la Universala Kongreso en Vieno, nia prezidanto Franz Josef Braun estis aranĝinta du vizitojn de IKEF-anoj kaj aliaj interesitoj ĉe la kompanio SIEMENS AUSTRIA kaj ĉe aŭstria Bundeswirtschaftskammer (Federacia Ekonomia Ĉambro). Ĉe firmao SIEMENS ni povis viziti la fabrikon por aŭdio-video-sistemoj kaj ricevis informojn pri tio kaj pri la kompaniego SIEMENS entute. Ĉe la Federacia Ekonomia Ĉambro ni ricevis interesajn informojn pri la aŭstria ekonomio kaj pri la taskaro de tiu institucio, kiu en tiu formo ŝajnas esti unika en la mondo. S-roj Heckhausen kaj Braun prizorgis la tradukon germane-Esperante.

En "La Merkato" n-ro 38 de oktobro 1992 aperis detala raporto pri tiuj okazaĵoj. Evidentiĝas ke tiaj vizitoj estas ege utilaj, ĉar ili montras al la ne-Esperantistaro la veran funkciadon de nia lingvo. Post tiuj aranĝoj 1988 en Rotterdam, 1991 en Bergen kaj 1992 en Vieno, ni klopodos ĉiujare dum la UK organizi tiajn vizitojn ĉe lokaj kompanioj aŭ institucioj.

Taŭgan solvon ni trovis dum la jaro 1992 por la pritraktado de leteroj de Esperantistoj el nepagipovaj landoj pri deziro/propono/oferto pri komercado. Sub la titolo "*monda merkato* helpas", nia komunikilo "La Merkato" n-ro 36 de

aprilo 1992 raportis pri nia faro kaj eĉ la Esperanto-gazeto "Eventoj" represis tiun artikolon favore al pli vasta diskonigo al la Esperantistaro. La sistemo estas simpla: Ĉiu tia ricevita letero estas sendota tra s-ro Rotsaert al "*monda merkato*", tutmonda informada servo kaj anonca gazeto de Linguistisches Bureau Alfred Schubert, Germanio.

"*monda merkato*" per eldona kvanto de 2000 ekzempleroj diskonigas la enhavon de ĉiu tia letero per konciza anonco senpaga por la sendinto. IKEF transprenas la kostojn de tiaj anoncoj kaj de la alsendo de "*monda merkato*" al ĉiuj IKEF-membroj. Se el tiuj anoncoj poste estiĝos negoco, ni atendas de la vendisto konvenan procentaĵon el la vendosumo por IKEF. Intertempe la estraro de IKEF decidis plilongigi ĉi tiun procedon kaj servon ankoraŭ dum la tuta jaro 1993. Sendepende de tio ni aperigis diversajn etajn anoncojn en nia "La Merkato".

Nia estrarano F.X. Gilbert, Francio, ripetis en 1992 sian faron de 1986, prizorgante reeldonon de KIU FARAS KION ?, kvarlingva broŝuro pri mozaj industriaj produktoj fare de sia Komerca Ĉambro de Bar le Duc. Laŭdinda kaj imitinda agado !

<u>Ĝenerala Kunveno 1992 en Vieno</u>

La Ĝenerala Kunveno 1992 de IKEF-membroj okazis kadre de la UK en Vieno, je la 27a de julio 1992. Ĝi elvokis grandan intereson. Krom 19 membroj (inter ili ses el sep estraranoj, rekordo !) ĉeestis 31 interesitoj, kiuj kundiskutis. Kiel prezidanto s-ro Braun estis reelektita.

La pridiskutitaj temoj etendiĝas al preskaŭ ĉiuj kampoj de ekonomia komerco, kun ĉiam ĉefa celdirekto: kiel plivastigi la praktikan uzon de Esperanto en nia fako.

<u>Resumo</u>

En 1992 la membrara nombro ree kreskis. Tio pruvas la intereson de Esperantistaj ekonomiistoj/komercistoj. IKEF intertempe ankaŭ ĉe UEA kaj aliaj asocioj gajnis renomon. Pli ofte IKEF estas menciita en prelegoj, artikoloj, entute en la Esperantista gazetaro. Tio estas pruvo pri la engaĝita laboro de la estraro kaj pri seninterrompa prospero de la fakgrupo ekde ĝia fondo en 1985.

## **<u>Novaj aliĝoj</u>**

169. S-ro Stanisław STASZEWSKI - Firmao PULSO, ul. Moniuszki 2, PL-95-070 ALEKSANDRÓV Ł, Pollando
170. Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW DEN HAAG, Nederlando
171. D-ro Petr CHRDLE, Anglicka 878, CZ-25229 DOBRICHOVICE, Ĉeĥio
172. S-ro Jiří VOMÁČKA, Koterovská 30, CS-301 41 PLZEŇ, Ĉehio
173. S-ino Ginka DILOVA, konstru-teknikisto (propra firmao), str. Bajlovo bl. 86, vh B, ap. 31, BG-1517 SOFIO, Bulgario

## **TAKE - Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj**

Sub la direktado de Michel BASSO kaj kun la helpo de Jean-Pierre CANCEL, inĝeniero pri komerco, la fondgrupo de la asocio elpensis merkatesploran strategion, kio maloftas ĉe domkonstruistoj, kaj des pli en asocio !

La strategio konsistas en tri punktoj:

1. Ellaboro de demandaro, cele al kiel eble plej taŭga precizigo de la BEZONOJ de la estontaj membroj de FAKE.

2. Adoptado de la sciigitaj bezonoj al la CELOJ kaj RIMEDOJ de la kreota asocio.

3. Starigo de STRUKTURITA AGADA PROGRAMO.

170 enketiloj estas senditaj kaj 47 % de la respondintoj tre rapide montris intereson. 44 landoj povus konsistigi potencialan merkaton. Ni atendu la definitivajn rezultojn.

Post la unua fazo finota per ekonomika analizo ni transiros al la dua paŝo: la oficiala kreo de TAKE.

Michel BASSO

P.S. Se la projekto interesas vin, bonvolu kontakti:

TAKE
RN 83 - rue de Tiefenbach, F68920 WINTZENHEIM, Francio
Telefono 89.79.79.92, telefakso 89.79.79.93.

## **Polo ekkonas okcidentan ekonomion**

Dum mia vizito en Germanio, Belgio kaj Francio mi renkontiĝis kun esperantistoj kaj, helpe de ili, kun oficistoj de komercaj ĉambroj kaj entreprenistoj. Tiuj ĉi renkontiĝoj donis al mi bildon de funkciado de entreprenoj en okcidenta Eŭropo.

Mi vidas, ke entreprenoj en okcidenta kaj orienta Eŭropo elkreskas sur tute aliaj fundamentoj kaj aliaj cirkonstancoj. Dum en oriento rapide kreskas malgrandaj entreprenoj kiuj laboras laŭ bezono de merkato kaj ŝanĝas sian specializecon, en okcidento ekde multe da jaroj ekzistas firmaoj kiuj regas kaj kreas merkaton. Ili devas ĉiam strebi por krei pli novajn, pli interesajn varojn.

Ni en oriento povas facile krei proprajn entreprenojn malgraŭ manko de kapitalo, sed ni, malgrandaj entreprenistoj, ne estas konvenaj por okcidentaj firmaoj, kiuj, se temas pri eksporto-importo, kutimas havi grandajn mendojn.

Ĉe ni ne tiel ĝenerale "regas" angla lingvo. En internacia komerco ni jam uzas kontraktojn skribitajn nur en Esperanto, ĉar nia leĝo permesas tion fari kaj tie ĉi ekzistas firmaetoj kiujn posedas esperantistoj. Do ĉu ne venis tempo por fari pli ?

Nun por nia internacia komerco ni bezonas fakturajn formularojn. Sur tiu ĉi kampo fakuloj el okcidento povus helpi al ni. Ankaŭ ni bezonas modelojn de internaciaj komercaj dokumentoj por eksporto-importo.

Unue gravan rolon povas plenumi dulingva fakturo. Kia estas la ideo ? Ĉiuj dulingvaj fakturoj devus havi en la sama loko la samajn surskribojn en Esperanto. Sube ĉiu surskribo devas havi tradukon en nacia lingvo. Traduko sendepende de la lingvo devas esti en la sama loko. Havante matricon de la fakturo, mi povas presigi fakturojn kaj sendi kelkajn al entrepreno kun kiu mi komercas. La samon (fakturojn kun lingvo de mia kunlaboranto) mi ricevos de ĝi. Kunmetinte dulingvajn fakturojn (kun pola lingvo kaj lingvo de eksterlanda entrepreno) mi skribas tion, kion mi bezonas kune sur mia pola kaj eksterlanda fakturoj. La unua restos ĉe mi (neniu oficisto kaj doganisto povas diri, ke li ne komprenas ĝin) kaj dua kun varoj veturas al eksterlando. Estos inverse kiam mi mendos kaj ricevos varojn.

Nun ni uzas diversajn fakturojn. Do ni bezonas taŭgajn, universalajn, modernajn modelojn. Ĉu inter IKEF-anoj estas kompetentuloj kiuj havas tempon por fari tion ?

Se ni sukcesos kun fakturoj, ni povas provi fari aliajn dokumentojn ankaŭ en Esperanto. Plej bezonata estas modelo de kontrakto en Esperanto inter orienta esperantista entrepreno kaj entrepreno en okcidento (ne necese esperantista).

St. STASZEWSKI

Noto de la redaktoro

Iu suborganizo de la Unuiĝintaj Nacioj (en Svislando aŭ Aŭstrio ?) jam ellaboris modelojn de ĉiuj komercaj dokumentoj. En tiuj modeloj ĉiuj gravaj informoj havas fiksan lokon, tiel ke ne plu necesas serĉi sur fakturo la telefonnumeron, la AVI-kodon, la finsumon de la fakturo, la pagkondiĉojn...

Ĉu iu membro de IKEF konas tiun organizon kaj kapablas akiri tiujn modelajn dokumentojn ? Eble iu pretas esperantigi ilin ?

En venonta numero de La Merkato aperos raporto de ĉina komercisto kiu vojaĝis en eksa Soveta Unio.

RR

## Plena Pekoteko 1985-1990

Antaŭ nelonge aperis (en tri volomoj, entute pli ol 1800 paĝoj) la nocio-kompleksoj ekregistritaj dum la jaroj 1985-1990 en kadro de la per-komputora terminio-kolekto.
Prezo: 80.00 usonaj dolaroj + sendkosto. Mendu ĉe R. Eichholz, Esperanto Press, Bailieboro, Ontario, Canada K0L 1B0.